

L.L. Zamenhof – Ĉu „ruslanda hebreo“ aŭ „filo de Pollando“ ? Kelkaj notoj pri la identeco(j) de L.L. Zamenhof

Se oni celas pedante esplori la temon en ties multifaceteco, la difino de la identeco(j) kaj grupa(j) aparteneco(j) ĉe individuo ĝenerale, kaj ĉe L.L. Zamenhof aparte, estas eble iom komplika, konfuza afero. Rilate la difinadon de la grupa aparteneco de iu homo ekzistas diversaj vidpunktoj, akcentadoj, interpretoj kaj komprenoj,¹ sed eble nur unu vero. Necesan konsideri almenaŭ la gentan, etnan, nacian, lingvan, nacian, geografian, ŝtat-civitan kriteriojn. Ĉar en la jubilea jaro de Zamenhof reaperis mencioj (kaj diskuto) pri la „polo“ Zamenhof,² indas kaj necesas retrakti la temon por atentigi pri fontoj de miskomprenoj, kiuj aperis lige kun tiu nomigo. Kvankam mi komprenas, ke iuj esperantistoj, eĉ kleraj kaj informitaj, ĉe kiuj la tradicia kliŝo de la „polo“ Zamenhof persiste konserviĝas, ne deziras reveni al tiu diskuto, indas tamen ripeti kelkajn klarigojn.³ La diskuto pri la nacieco de Zamenhof ne estas nova, sed laŭ mi ĝi ne estis finfarita unue eble pro manko de detalaj historiaj konoj pri la situacio de la tiama vivotempo de Zamenhof, due eble pro malinteresiĝo.

En ĉi tiu kontribuado mi celas trakti la temon el kvar perspektivoj:

1. Pri la naskiĝo de la moderna nacio
2. Pri la nacia situacio kaj diskuto en Pollando/Ruslando en la tempo de L.L. Zamenhof
3. Fontoj de klarigoj pri identeco ĉe L.L. Zamenhof
4. Terminologiaj solvoj

1. Naskiĝo de la moderna nacio

En la mezepoko ne ekzistis etnaj-naciaj kriterioj por difini ies grupan apartenecon, sed ĉefe sociaj-politikaj (klasoj, kastoj), religiaj kaj lingvaj. Historiistoj (ĉefe polaj kaj germanaj) disputas ĝis nun ekzemple pri la demando, ĉu Nikolao Koperniko, kiu vivis en la 15-16aj jarcentoj, estis polo aŭ germano (aŭ sileziano).

En la latina lingvo *natio* signifis komunumon de homoj samdevenaj kaj kunligitaj per samaj lingvo, moroj kaj tradicioj, en la romia senco kiel signifo por fremda enmigrinta popolo kunvivanta kun la indiĝena loĝantaro. Laŭ tiu uzo en la kristana latino *nationes* kaj *gentes* signifis unuavice la nejudajn paganojn, kiuj formis kune kun la kristanoj komunan eklezion. Tio signifas, ke judoj apriorie estis ekskluditaj de iu *natio* aŭ *gens* en la mezeŭropa kristana percepto. En mezeŭropaj universitatoj la studentoj estis registritaj laŭ nationes: En Parizo ili estis nomitaj gaŭloj (i.a. italoj, hispanoj, grekoj k.a.), normanoj, pikardoj kaj angloj. En la praga universitato apartenis al la ‚pola‘ nacio ankaŭ la prusoj, silezianoj kaj germanoj el pollandaj regionoj, la ‚bohemiaj‘ kongruis kun la ĉeĥoj, hungaroj kaj sudslavoj, kiel

¹ Vd. ekzemple la mesaĝon de Christophe Zamenhof-Zaleski pri la Zamenhof-jaro aŭ la artikolon de Jacek ‚Zamenhof - filo de pola tero aŭ homarano?’ en Ipernity (<http://www.ipernity.com/blog/39838/108222>).

² Ekzemple sur la dorsflanko de la Eo-germana/germana Eo-vortaro (2008) de Matthias/Weidmann estas notite, ke Zamenhof estis pola kuracisto kaj filologo (sic!), aŭ en iu recenzo de Till Dahlenburg (en *Interlinguistische Informationen*, N-ro 69, p. 5), kie estas skribite (traduko el la gemana de aK): „Mallerte estas, ke Krasnikov tiom enfokusigas la Ruslando-devenon de Esperanto en la centron de la atento, tiel ke la pola nacieco de Zamenhof estas simple ignorata.”

³ Artikoloj pri tiu ĉi temo ja aperadis jam pli frue en la Eo-gazetaro.

‚bavaroj’ estis konsiderataj ankaŭ ŝvaboj, frankoj, rejnlandanoj, vestfalianoj ktp. kaj la ‚saksoj’ reprezentis la nordgermanojn, danojn, svedojn kaj finnojn.

Kun la franca revolucio la nocio de la nacio ricevis sian modernan signifon, kiu celis la tutecon de iu popolo, kiu loĝas sur iu konkreta teritorio, aŭ en iu konkreta lando, sendepende de la kultura aŭ etna aparteneco, sed pro ligiteco al iu socia interkonsento aŭ konstitucia kontrakto. Ĉi tiu nova ‚ŝtata popolo’ en la internacijura senco fariĝis unu el la tri elementoj kune kun la ŝtata teritorio kaj la ŝtata povo. Pri la klarigo de la diversaj nuancoj de la nocio ‚popolo’ mi rezignas ĉi tie.

Samtempe kun la establiĝo de tiu nova internacijura koncepto de la ‚ŝtata nacio’ fortiĝis en la epoko de la naciismo de la 19a jarcento la etnaj-naciaj ambicioj de popoloj, kiuj ekzistis ĝis nun en la ombro de grandaj regnoj,⁴ de kiuj ili estis regataj, sen esti en jura senco rekonataj kiel memstaraj entoj aŭ minoritatoj. Ekzemple la slovakoj longe vivis en t.n. ‚Supra Hungarujo’, la slovenoj, nomataj alpaj slavo, karintianoj, stirianoj ktp. en la aŭstra parto, kaj kroatoj en la hungara parto de la Aŭstra-Hungara Imperio. Ankaŭ la latvoj kaj estonoj, kiuj estis nomataj ‚ne-’ aŭ ‚mal-germanoj’⁵ de la ilin regantaj baltaj germanoj estas bonaj ekzemploj de ‚neekzistantaj’ etnaj grupoj, kiuj havis la statuson maksimume de kamparanoj. Aliflanke ekzemple la poloj, ĉeĥoj, hungaroj kaj rusoj kiel reprezentantoj de la tiamaj regantaj klasoj havis jam longan ŝtatan-politikan historion kiel signifaj etnaj-naciaj entoj kun dinastiaj tradicioj.⁶ Plej malfrue kun la jagielonoj la litovaj nobeloj kvazaŭ kunfandiĝis en tiu (komuna pola-litova/-rutena-ukraina/) genealogia arbo kaj apenaŭ plu ludis gravan rolon el etna litova senco. Kiel memstara etno litovoj reaperis, paralele kun latvoj kaj estonoj, nur en la malfrua 19a jarcento lige kun la ĝenerala etna emancipiĝa procezo de preskaŭ ĉiuj mezorienteŭropaj popoloj slavaj kaj aliaj. La vivotempo de Zamenhof plene koincidis kun la eksplodo de tiuj naciismaj strebadoj kaj la emancipiĝa procezo de diversaj ĝis nun subpremataj etnoj. Eĉ la hebreoj (judoj, izraelidoj) en diverslandaj diasporoj komencis demandi sin, ĉu ni estas etno, nacio, popolo aŭ ĉu nur (pseŭdo-)religia grupo kun certaj tradicioj. El tio naskiĝis la cionismo, kiu estis la specifa naciisma movado de la hebrea gento. Kiel konate, L.L. Zamenhof unue verve agadis por la cionismo, por poste entute forlasi ĝin.

2. Nacia situacio kaj diskuto en Pollando/Ruslando en la tempo de L.L. Zamenhof

Ĉi tiu iom longa teoria enkonduko en la internaciajuran koncepton de la moderna nacio estis bezonata por klarigi nun la specialan situacion en Pollando, kie la kompreno pri ‚pola nacio’, pro ‚poleco’ estis nedisigeble ligita kun la ‚pola nobelaro’, pollingve nomata ‚ŝlaĥto’. Ĉi tiu aparta klaso (aŭ kasto) supozeble elformiĝis en la mezepoko sub la dinastio de la polaj piastanoj surbaze de la armiloporta kamparanaro en la bataloj kontraŭ diversaj malamikoj: la bohema reĝlando, la germanaj reĝoj, Litovujo, la baltaj praprusoj kaj la Teŭtona Ordo. Origine, la pola nobelaro konsistis do sole el militistoj, kiu en la 16a jarcento kreis la institucion de la ‚nobela respubliko’ (pole: Rzeczpospolita = res publica), kio estis io unika en Eŭropo. Temis pri monarkio, en kiu la reĝo venas ne laŭ la sukcedo, sed laŭ demokratia

⁴ Ĉefe Ruslando, Aŭstrujo-Hungarujo, Germanujo-Prusujo kaj Osmana Imperio

⁵ Germanlingve: Undeutsche

⁶ En la mezepoko ekzistis ĉefe jenaj dinastioj: piastanoj (Pollando), gediminidoj (Litovio), premislidoj (Bohemia), arpadanoj (Hungario), jagielonoj (poloj); ĉe la rusoj rurikidoj kaj poste romanovidoj. Estonoj kaj latvoj ne havis proprajn dinastiojn, blankrutenaj/belorusaj, kiuj iam havis proprajn nobelojn, kaj ukrainoj, kiuj referencas al la princoj de la mezepoka Kieva Rusujo, miksiĝis kun polaj-litovaj nobeloj. Kompreneble, la hebreoj havis neniam nobelajn dinastiojn en la diasporo; iliaj elitanoj estis religiuloj (rabenoj ktp.) kaj haskalianoj (anoj de la kultura popolkleriga movado), poste ankaŭ iuj politikaj aktivuloj.

elekto. Unike en Eŭropo estis ankaŭ, ke la nobelaro konsistigis ĝis 10 procentojn de la loĝantaro, kio estis pli alta procentaĵo kompare kun aliaj eŭropaj landoj kaj signifis por la nenobelaj urbanoj (plebo) kaj kamparanoj, kiuj eĉ ne estis alkalkulataj la la ‚nacio‘, grandan ŝarĝon. La pola nobela strukturo konsistis el la alta nobelaro (magnatoj) kaj la malalta nobelaro. La kremo de la kremo de la magnato estis ege riĉa. Laŭ iu teorio estis formulita la paradigmo de la ekskluziveco: ŝlaĥtano = katoliko = polo (= homo). Jen la kondiĉoj por esti ‚civitano‘ de tiu lando. Alia specifaĵo estis, ke la Pola Reĝlando formis kun la Litova Grandduklando komunan federan ŝtaton, kiu estis formaligita en la Lublina Unio de 1569. Famaj fariĝis en la 16a jarcento la tri eldonoj de la Litova Statuto, kiu estis konsiderata kiel moderna kodaro-leĝaro, unika en (orienta) Eŭropo.⁷ La unuan skribitan konstitucion en Eŭropo ĉi tiu respubliko donis al si nur en 1791.

Ĉar la najbaroj de Pollando-Litovujo, Prusujo, Aŭstrujo-Hungarujo kaj Ruslando malŝate observis la politikan evoluon en Pollando, pri kies detaloj ni ne povas raporti ĉi tie, ili decidis dispartigi (tranĉi) la polan-litovan ŝtaton inter si, tiel ke en 1795 tiu ĉi ŝtato malaperis de la eŭropa mapo. La dispartigo estis konfirmita en la Viena Kongreso de 1815. Samtempe estis fondita nova Pola Reĝlando, nomata ankaŭ Kongresa Pollando, kiu ekzistis, kun propra, de Ruslando altrudita konstitucio (ĝis 1831) kiel protektorato de la rusa caro aŭ alivorte en persona unio kun tiu, kiu estas ankaŭ Reĝo de Pollando.

Do, ĉi tiujn tre resumajn antaŭklarigojn pri la tempo ĝis 1795 necesis aldoni por kompreni la situacion de la poleco en la 19a jarcento.

„Ruslanda hebreo“

L.L. Zamenhof plurfoje klare kaj nemiskompreneble substrekis, ke li estas „ruslanda hebreo“, ke lia patrujo estas „Litovujo“, sed ankaŭ, ke oni povas nomi lin „filo de pola tero“ (1912). En letero al la berlinaj esperantistoj de 1904 Zamenhof emfazis, ke lia nomo estas germandevena. Plena konfuzo, ĉu ne ?

Por kompreni pri kio temas ĉe tiuj diversaj identecoj, kiujn Zamenhof subjektive aŭ objektive donis al si mem, necesas fari kelkajn, iom pli profundajn klarigojn.

Pri la hebreco de Zamenhof ekzistas multaj dokumentitaj atestoj, kiujn oni trovas en la verkaro de Zamenhof mem, do ĉi tie oni ne devas ilin ripeti, des pli kaj ekzistas kelkaj fakaj studoj pri la temo.⁸ Sekve ni turnu nian atenton al la malpli klaraj kaj malpli konataj nocioj.

La *Ruslanda Imperio*, al kiu en la vivotempo de Zamenhof *Pollando* apartenis kiel protektorato (formale Reĝlando), kaj kun kiu ĉiuj refleksoj de Zamenhof estis ligitaj, estis granda multetna mikspoto, en kiu la grandparte senrajtaj homoj povis havi samtempe diversajn identecojn. Sed ili ja ĉiuj estis rusaj regatoj, sendepende de ilia etna deveno, do iusence ‚civitanoj‘ de Ruslando.

⁷ Interesa estas la fakto, ke tiuj tri eldonoj de la Litova Statuto estis redaktitaj en la slava rutena lingvo, kiu signifas arkaikan version de la nuna belorusa skriblingvo kaj kiu funkciis dum certa periodo kiel oficiala lingvo de la Litova Grandduklando, kiu vaste etendiĝis tra rutenaj (belorusaj), kaj cetere ankaŭ ukrainaj, lingvoregionoj.

⁸ Ekzemple vd. miajn proprajn artikolojn en *Franca Esperantisto*, n-ro kaj en *Esperanto* (UEA), 2(2009, p. . kaj vd. la plej freŝdatan artikolon de Josef Ŝemer pri tiu temo en *Esperanto* (UEA), 3/2009, p. 57-58. Krom tio rekomendindas legi la librojn de A. Holzhaus kaj precipe *La kaŝitan vivon* de Zamenhof de N.Z. Maimon (1978).

„Litovujo“

Krom en la fama parolado en Guildhall en 1907, en kiu li proklamis sian patrujon Litovujo, Zamenhof ripetis en sia letero al la krakova LKK en 1912, ke li „naskiĝis en Litovujo“. Ĉi tiu almenaŭ dufoje uzata geografia nocio de Zamenhof por difini lian (originan) patrujon certe plej forte mirigis kaj konfuzis la esperantistojn. Kial do Litovujo, des pli ke Zamenhof tute ne estis etna litovo, due ĉar li ne klarigis la signifon de tiu nocio, trie ĉar Bjalistokon oni apenaŭ povas apartenigi al Litovujo dum la vivotempo de Zamenhof (ĝi apartenis al la gubernio de Grodno kadre de la Rusland Imperio, kaj kiel Boulton prave rimarkigis, al la iamaj „litvaj provincoj“). Same kiel Pollando, Litovujo ne ekzistis en la jura-politika senco. Kaj ĉar la caraj aŭtoritatoj malŝatis la nomon de Pollando, precipe post la ribeloj de 1830/31 kaj 1863, ili entute abolis la nocion Pollando kaj uzis en sia burokratia terminologio la nocion ‚Vistullando‘.

Antaŭ 1918, kiam unufoje komencis estiĝi la ŝtateco belorusa, ĉio oriente de la linio Grodno-Brest estis konsiderata kiel ‚Litovujo‘ (kvankam en etnografia senco ja belorusa/blankrutena).⁹ Historie, la urbo Bjalistoko ja estis fondita kaj longe posedata de litovaj granddukoj kaj ĝi apartenis al la Litova Grandduklando, ĝis kiam ĝi transiris al la manoj de polaj(-litovaj) hetmanoj kaj nobeluloj kaj fariĝis (en 1569) pola parto de la komuna Pola-Litova Respubliko. Plej malfrue ekde tiu dato etnaj litovoj perdis pli kaj pli sian signifon en tiu komuna ŝtato, kiu estis regata de polaj nobeloj (kies genealogian devenon necesus klare koni por esti certa, ĉu ili estis polaj aŭ litovaj aŭ blankrutenaj, aŭ ukrainaj aŭ io alia, krom tio malpli gravis la etna aparteneco, sed pli la aparteneco al socia statuso simila al kasteco kiel supre menciite). En 1807, post kelkvara situo en Prusujo, Bjalistoko estis transprenita de la rusa caro. La historio de Bjalistoko estas do same komplika,¹⁰ aŭ almenaŭ multfaceta, kiel la identeco de Zamenhof mem. Tiu konstato allasas la hipotezon, ke la problemoj de la identeco de Zamenhof estas intime ligitaj kun la historia evoluo de Bjalistoko, aŭ eĉ estas rekta logika sekvo de tiu historia komplikeco. Ĉu Zamenhof konis tiun historian fonon en ties detaleco oni ne scias, sed eble li almenaŭ (sub)konsciis pri ĝi.

La limo inter la pola kaj litova, respektive poste la rusa parto de tiu komuna pola-litova ŝtatego, kiu ĉesis ekzisti en 1795, estis ie inter Bjalistoko kaj Grodno, foje oriente, aliffoje okcidente de Bjalistoko. Do, Bjalistoko estas elstara kaj komplika ekzemplo de urbo ĉe la limoj de Litovujo, Pollando – kaj oni ne forgesu – Blankrusujo (aŭ Blankrutenio), tria grava etnografia tereno, kiu integre konsistigis la polan-litovan respublikon (kun, kvare, la ukrainaj terenoj en la sudo).¹¹ Belorusoj (blankrutenoj) kaj litovoj loĝis en kaj en vilaĝoj ĉirkaŭ Bjalistoko. Ankaŭ ukrainoj estis tie: Dum la dua mondmilito ukrainaj (kaj litovaj) helpolicistoj ludis aĉegan rolon en la nacisocialistaj koncentrejoj de Pollando kaj Litovio, helpante murdi la judojn. Ĉiukaze la litova elemento devis ludi certan rolon en la bjalistoka tempo de Zamenhof, ĉar Privat emfazas ĝin en sia ĉapitro pri ‚Infano en Bjalistok‘ (supozeble Zamenhof mem rakontis al li tiujn detalojn).

⁹ La tradicia loĝteritorio de litovoj en mallarĝa senco etendiĝas en la regionoj de Aukštaitio (Supra Litovio), Ĵemaitio (Malsupra Litovio), Dzukija (suda), do inter Vilno, Kaŭno kaj Suvalki; en pli larĝa senco ĝi etendiĝas ankaŭ al Königsberga regiono (litovlinge: /Karaliaŭčius) kaj Memellando/Klaipeda ĝis Bjalistoko/Grodno, kie vivis la baltaj prusoj kaj jotvanoj. Kaj norde de la litovoj vivis/as la latvaj triboj.

¹⁰ Vd. mian artikolon: Künzli, Andreas: Bjalistoko. Orienteŭropa enciklopedieto. En: *Spegulo*, 2/2009, p.

¹¹ Vd. la artikolon de Gabi Kosiarska kaj Barbara Pietrzak pri la historio de Bjalistoko en Esperanto, februaro 2009, p. 36-37. Iom pli detala, originale verkita historio de Bjalistoko, aperis en *Spegulo* 2/2009.

Cetere laŭ iuj indikoj¹² en la vivotempo de Zamenhof loĝis en Bjalistoko nur ĉ. 3000 poloj, dum ĉ. 4000 rusoj kaj blankrutenoj, 6000 germanoj kaj 18000 judoj.

Litvaj judoj

Due, la familio de Zamenhof devenis de la tiel nomataj lit(o)vaj judoj (laŭ la pola lingvo: ‚litvakoĵ’), kiuj estis aparta grupo de la orienteŭropaj aŝkenazoj kaj laŭ diversaj kriterioj diferenciĝis de la polaj judoj. Ĉar la zamenhofoj devenis de tiuj lit(o)vaj judoj, kiuj setliĝis en la litova parto de la Pola-Litova Respubliko, Zamenhof nomis, ja devis nomi sian patrujon Litovujo. Post Babilono, Erec-Israel, Hispanio kaj Germanio Pollando kaj Litovujo fariĝis la patrujo de la migranta judaro. Ĉar Bjalistoko troviĝis sur la litova flanko de la iama Pola-Litova ŝtato, Litovujo logike estis nomata la patrujo de Zamenhof, kie li naskiĝis, sendepende de tio, ĉu poste ĝi estis posedata de poloj kaj rusoj. Precipe naciismaj litovoj kaj iuj litovaj esperantistoj volonte akcentas la litovan ‚genezon’ de Bjalistoko.¹³ En juda muzeo en Vilno eblas legi pri Ludovikas Lazaris Zamenhofas kiel ‚filo de Litovujo“.

En la Cara Imperio estis la provo asimili (adapti) la judojn. Tio sukcesis nur ĝis certa grado, precipe ĉe la intelektuloj kaj elituloj, al kiuj la Zamenhofoj apartenis, dum la malklera judaro estis konsiderata, de la cara registaro, kiel ne asimilita kaj ne asimilebla. Tio estis gravega socidemografia problemo. Post pogromoj kontraŭ la judoj, multaj judoj el Ruslando fuĝis al la Pola Reĝlando (sub cara protekto kun Varsovio kiel plej granda urbo), kie ili evidente ne estis tre bone akceptataj kaj de la etnaj poloj (kristanoj) kaj eĉ de la polaj judoj, kiuj vidis en la litvaj almigrintoj superfluan ekonomian konkurencon, ktp. Do, tiuj lit(o)vaj judoj, kiuj provis asimiliĝi en Ruslando, devis nun asimiliĝi duan fojon en Pollando al la nova polaj cirkonstancoj. Ĝuste Zamenhof troviĝis en tia malfacila situacio. Nature, li venis kun siaj gepatroj kiel junulo al Varsovio, kie lia asimiliĝo ankoraŭ eblis, dum ke por lia patro ĝi estis malpli facila. Sed ili tamen restis fremduloj, ĉar ili ne naskiĝis tie (kaj, kiel ni vidis, Bjalistoko estas speciala limkazo). Por la infanoj de Zamenhof la asimiliĝo kaj integriĝo en Pollando estis poste evidente pli facila, ĉar aperis pola ŝtato, ktp. Sed ĉar ili estis judoj, ili denove suferis pro la kreskanta antisemitismo en la intermilita Pollando kaj fariĝis minacataj kiam la naciistoj ekregis. Sendube, L.L. Zamenhof, kiu apartenis al la hebrea gento kaj kiu estis rusa regato (li nomis sin oficiale ‚ruslanda hebreo“),¹⁴ kiu konsideris sian historian patrujon Litovujo kaj kiu vivis kaj laboris sur la teritorio de polaj landoj (Podlaĥio, Mazovio), devis elturniĝi kun pluraj identecoj, inkluzive de la sociaj subgrupoj supre menciitaj. Estas sciata, ke finfine li rezignis pri konkreta aparteneco kaj volis esti nur ‚homarano“, ‚homo“, en senco sennaci(ism)a.

Juda Bjalistoko

Legante poldevenajn historiajn skizojn pri Bjalistoko, mi rimarkis, ke poloj ŝatas akcenti la ‚gloran polan“ pasintecon de tiu urbo, pli malpli elfokusigante la judan dimension de tiu urbo, kiu tamen dominis la tuan 19an jarcenton ĝis la dua mondmilito, kiam la judaro de tiu regiono

¹² Centassi/Masson: La homo, kiu defiis Babelon, p. 14. Laŭ aliaj indikoj estis apud 70% da judoj 20% da poloj kaj 5% da germanoj. En sia tudo pri Zamenhof (1929) Drezen eĉ indikis 80% da hebreoj kaj la reston la dividis inter rusoj, poloj, germanoj.

¹³ Vd. la artikolon *Zamenhofa Bjalistoko* de Vytautas Šilas en Litova Stelo, decembro 2008, p. 9-11.

¹⁴ Vd. mian artikolon: Franca E-isto.

malaperis en la holokaŭsto (ŝoao). Rilate la judan aspekton, la propagandeca-turismeca-folkloreca naciisma pola ‚historiografio‘ (praktikata ankaŭ de esperantistoj) limigas sin al la plej koncizaj informoj ĉefe pri la bjalistoka geto kaj la tragedio dum la dua mondmilito.¹⁵ Por tiu historia periodo temas pri ĝis 70 procentoj da judaj loĝantoj en la kazo de Bjalistoko. Do iam judoj ludis la dominan rolon en Bjalistoko. Hodiaŭ laŭ mia scio ne plu vivas judoj tie (dum ekzemple en Grodno jes). En 1939 Bjalistoko situis eĉ en belorusa sovetia respubliko. En 1945 estis tamen decidite, kiel en 1920, ke Bjalistoko apartenu al Pollando.

Zamenhof kaj la dilemo kun la poleco

Pro la montrita konstelacio la faktoj parolas pri tio, ke Zamenhof estis ĉio alia ol polo en etna aŭ alia senco. Komprenoble li scipovis la polan lingvon, kaj en Varsovio, kie li vivis ekde 1873, li pli ofte uzadis la polan lingvon. Al Michaux li skribis en 1905, ke la polan lingvon li parolas libere, kaj al Thorsteinsson li raportis (1906), ke en Varsovio li parolas pli ofte la polan, kvankam la de li preferata Ĉeflingvo restis la rusa.

Al la krakova LKK en 1912 Zamenhof ja skribis ke „En la okazo, se Vi nepre bezonos paroli pri mia persono, Vi povas min nomi ‚filo de pola lando‘ (ĉar neniu povas nei, ke la tero, en kiu kuŝas ambaŭ miaj gepatroj kaj sur kiu mi konstante laboras kaj intencas labori ĝis mia morto, estas mia hejmo, kvankam mi ne estas naciisto), sed ne nomu min ‚polo‘, por ke oni ne diru, ke mi – por akcepti honorojn – metis sur min maskon de popolo, al kiu mi ne apartenas“. (...) Mi sciigas Vin, ke laŭ mia politika-religia konvinko mi estas nek polo, nek ruso, nek hebreo, mi estas partiano de ‚homaranismo‘ (ne miksu min kun ‚kosmopolitismo‘). Bone, la homaranismo estis la inventaĵo de Zamenhof, dum polo, ruso, litovo ktp. estis reale ekzistantaj kategorioj. En sia hilelismo de 1901 li emfazis, ke poloj havus nenion komunan kun judoj kaj ke el judo neniam povus fariĝi polo. Estas klaraj eldiroj. Kaj kadre de sia homaranismo li proponis la terminon ‚Varsovilando‘ anstataŭ la pli naciisma Pollando. Sed tio estas specifaj ĉe Zamenhof, kiu cetere neniam pledis por la ‚pola nacia afero‘. Zamenhof loĝis en Bjalistoko kaj Varsovio, du urboj intime ligitaj kun la historio de Pollando, kaj Zamenhof parolis kaj utiligis la polan, same kiel li parolis la rusan kaj jidan. Ĉi tiuj faktoj povus pravigi aserton pri lia eventuala ‚poleco‘, sed ili ne sufiĉas por fari el Zamenhofo polon, despli ke Zamenhof ne konsideris sin polo. Lia poleco estis inventita por kaŝi lian judecon.¹⁶

Akceptebla estus, se en Esperanto oni nomus lin pollandano, analoge al ruslandano (en la pola lingvo, aŭ en la germana lingvo aŭ an aliaj lingvoj oni ne distingas *polski* kiel ekzemple en la rusa *ruskij* de *rossijski*). Eble ankaŭ tiu detalo estis fonto por miskompreno. Sed kiel traduki ‚pollandano‘ al nacilingvoj ?

Do, dum ŝajne ne plu ekzistas dubo, al kiu apartenas Bjalistoko, daŭre restas malcerteco kaj embaraso pri la aparteno de Zamenhof.

Tempoj ŝanĝiĝas kaj kun ili la sorto de urboj kaj homoj.

Malgraŭ sia specifeco eble iom akademieca, ĉi tiuj klarigoj (en tiu aŭ alia formo) laŭ mi estas gravaj, ĉar en ontaj libroj pri Zamenhof necesas ilin konsideri.

aK 2013

¹⁵ Komparu ekzemple la artikolon de Gabi kaj Barbara Pietrzak en Esperanto (UEA)

¹⁶ Interesa estas la observo, ke kvankam en la tradiciaj biografioj pri LLZ li estas traktita kiel hebreo/judo, oni tamen prezentas lin kiel polon ĝenerale.

